

Johann Wolfgang von Goethe, Из Гёте	Johann Wolfgang von Goethe, Egalaĵo (Nok- tokanto de mi- granto)	Johann Wolfgang von Goethe, Super montoj regas kviet'	Johann Wolfgang von Goethe, Same tiel
<i>tradukita de Михаил Лермонтов</i>	<i>tradukita de Manfredo Ratislavo</i>	<i>tradukita de Poul Thorsen</i>	<i>tradukita de Richard Schulz</i>
Горные вершины Спят во тьме ночной; Тихие долины - Полны свежей мглой; Не пылит дорога, Не дрожат листья ... Подожди немного, Отдохнешь и ты.	Super ĉio iĝas Kviet', Kaj ne moviĝas Pro ventet' Iu foli'; Silentas la birdoj ĉirkaŭe. Atendu – baldaŭe Ripozos vi.	Super montoj regas kviet', tra l' foliaro nur ventet' spiras kun trem'. Birdoj arbare silen- tas, se vi atendas, pacas vi mem.	Super ĉiuj montoj Trankvil', Kaj ĉiuj fontoj Sen babil'; Aŭdas vi ne Birdetan ĉirpon arba- re. Pensu prepare Pri la pere'!
...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en la Rusan de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27).

Arg-356-1908 (2013-12-12 22:16:00)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon

en <http://www.winter-zeulenroda.de/webseiten/lermontov.htm>.

Vidu ankaŭ la retejon <http://otvety.google.ru/otvety/thread?tid=6b82c0f69fbac986>.

Pri la poeto Lermontov vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджаил\\_Лермонтов](http://eo.wikipedia.org/wiki/Миджаил_Лермонтов).

La rusa titolo signifas: El Goethe. La poemo estas de M. Lermontov libere tradukita en la rusan. Ĝi estas konata en Rusio laŭ tiu ĉi titolo.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATILAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (\*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsenview>.

Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon <http://de.wikipedia.org/wiki/forpasis-poul-thorsen>.

Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).